

L'ALVOKO

OFICIALA ORGANO

de la

KEBEKA ESPERANTO-KLUZO

NUMERO 1.-

Mardon, 8-an de Majo - 1906

LETERO AL LA KLUBANOJ.-

Vi havas en viaj manoj la unuan ekzempleron de la oficiala organo de nia klubo: L'ALVOKO. Ni esperas aperigi ĝin ĉiunonate, eĉ dum la somero.

Vi rimarkos, ke ĝi enhavas interesajn artikolojn skribitajn de kelkaj el ni. Mi volas danki ilin por ilia partopreno. Tamen mi riskas kredi, ke en venonta eldono ni havos pli da kontribuantoj al nia ĵurnalo. Vi ne rajtas forgesi, ke tiu ĵurnalo estas via kaj la artikoloj estas viaj. La kvanto da artikoloj, kiuj vidiĝos en la sekvantaj ekzempleroj dependos de via kunlaborado.

Persistu kaj provu legi kun profito pere de la kontribuo de viaj kunklubanoj. Skribu seriozajn, skribu malseriozajn, sed skribu; tio estas la plej taŭga maniero por lerni.

Certe vi scivolas pri la artaĵo, kiu aperas sur ĉi-tiu paĝo. Tre feliĉe, unu el la membroj estas fleĝistino Hélène Richard, bone konata pentristino de Kebeko. Nuntempe, ŝi ekpozicias tridek pentraĵojn ĉe butikoj Zannetin. Mi invitas ĉiujn iri kaj admiri ŝiajn verkojn. En la nomo de ĉiuj mi prenas la liberecon gratuli kaj danki fraŭlinon Richard.

Fine, mi volas esprimi miajn kondesirojn por nia oficiala organo kaj longdaŭran vivon.

James E. Scanlon
Sekretario de K.E.K.

Hélène



LA DEVENO DE ESPERANTO.-

Ofta demando estas la jena: Kiel naskiĝis Esperanto? Ĉar tiu temo certe interesos la nove bakitajn esperantistojn en Kebeko, mi kaptas ĉi-tiun oportunecon uzante nian oficialan organon por atingi plej grandan grupon da interesataj personoj kaj respondi pri tiu ĝenerala demando.

Rakonti, en malmultaj vortoj, kiel oni kreas lingvon ne estas tre facila afero; tamen, flankenĵetante neutilajn detalojn, mi provos resumi la gravan aspekton de la naskiĝo de Esperanto.

La ideo krei internacian lingvon aperis ĉe Zamenhof ĉe lia plej frue infaneco. Li naskiĝis en Bjalostoko. La tiam logantaro konsistis el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj. Ĉiu elemento parolis apartan lingvon kaj neamike rilatis la aliajn elementojn. Zamenhof konvinkiĝis, ke la diverseco de lingvoj estas la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malmamikaj partoj.

De tiam, Zamenhof revis pri unu sola lingvo por ĉiuj. Dum kelka tempo, li intencis veturi en la tuta mondo kaj per flamaĵaj paroloj inklini la homojn revivigi unu el la antikvaj lingvoj, sed li fine venis al firma konvinko, ke tiu ideo estas nebla kaj komencis revi pri nova, arta lingvo.

Li ofte komencadis provojn, kiuj havis riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn, ktp. Sed homa lingvo kun ĝia senfina amaso de gramatikaj formoj, kun ĝiaj centoj da miloj de vortoj kaj kun ĝia dika vortaro sufiĉas por timigi eĉ la plej kuraĝajn geniulojn. Li ofte malkuraĝiĝis; tamen li ĉiam revenadis al sia revo.

Uzante la principojn de la ekonomio, li estis konvinkite, ke la vortoj devus havi plej malgrandan nombron da literoj. Li diris al si mem, ke anstataŭ la dekonulitera vorto, oni bone povus esprimi la saman ideon per la dulitera vorto. Tial li simple skribis la matematikan serion da plej mallongaj kunigoj de literoj kaj li donis al ili difinitivan signifon. (Eks. a, ab, ac, ... ba, ca, da, e, eb, ec, ... be, ce, ... aba, asa, ... ktp.) Tamen li tuj forĵetis tiun penson pro ĝia tro malfacila memorebleco.

Li fine konvinkiĝis, ke la materialo por la vortaro devas esti romana-germana. Li baldaŭ rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandan provizon da pretaj internaciaj vortoj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj.

Germanan kaj francan lingvojn li ellernadis en infaneco; sed kiam li estis en la kvina klaso de gimnazio, li komencis ellerni la anglan lingvon. Pro ĝia simpleco, Zamenhof rimarkis, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nenecese por la lingvo. Sub ties influo li komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonsajn formojn ĝis, kiam la gramatiko fariĝis plej malgranda kaj okupis nur kelkajn paĝojn. Sed la problemo de grandega vortaro ankoraŭ ne estis solvita.

Unu fojon, li okaze turnis la atenton al la surskribo SVEJCARSKAJA kaj al la elpendaĵo KONDITORSKAJA (Boutique à boisson - Boutique à sucreries). Ĉi-tiu SKAJA montris al Zamenhof, ke la sufiksoj donas la eblon fari multajn vortojn el unu. Sur la grandegajn vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis malgrandiĝi rapide. La tuta problemo estis nun solvita.

Li komprenis la gravecon plene uzi tiun forton. Li komparis vortojn, serĉis inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn kaj ĉiutage forĵetadis novan grandegan serion da vortoj, uzante sufiksojn.

La meĥaniko de la lingvo estis eltrovita. Li laboris kun amo kaj espero. Post nelonge, la tuten gramatikon kaj malgrandan vortaron estis skribitaj.

En la jaro 1878 la lingvo estis pli-malpli preta. Li komunikis pri ĝi al kelkaj siaj kolegoj. La neordinara facileco de la lingvo frapis ilin kaj ili komencis ĝin ellerni. La 5-an de decembro de 1878 okazis la unua kunsido, kie Esperanto estis parolata. Tiukeze, oni entuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis la sekvantaj:

"Malamikece de la Nacjes
Kado', kado', Jam temp' esta';
La tot' homoze in familje
Komunigare so deba'."

En la unua Esperanto tio signifas: "Malamikeco de la nacioj, falu, falu, jam tempo estas; la tuta homaro en familion unuigi devas."

Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo. Li estis ankoraŭ tro juna por eliri publike kun sia laboro; li decidis atendi ankoraŭ 5-6 jarojn kaj dumtempe uzi la lingvon praktike.

Liaj kolegoj komencis paroleti pri la nova lingvo kaj renkontis nur malkojn. Zamenhof restis tute sola. Dum kvin jaroj de lia estado en universitato, li neniam parolis kun iu pri sia afero. Tiu tempo estis por li tre malfacila.

Dum ses jaroj li laboris perfektigante kaj provante la lingvon. Kvankam en la jaro 1878 ŝajnis al li, ke la lingvo estis tute preta, vastaj provoj montris, ke kelkaj formoj estis fakte senbezona balasto. La lingvo ankoraŭ ne havis vivon nek difinitan "spiriton". Tiam, li komencis evitadi laŭvortajn tradukojn kaj penis pensi rekte en la lingvo. Fine, la lingvo akiris propran difinitan fizionomion.

Zamenhof finis la universitaton kaj komencis sian medicinan praktikon. Li ekpensis pri la publike eliro kun sia laboro. Pro maldolĉa financa situacio, dum du jaroj li vane serĉis eldonanton. Fine, post longaj klopodoj li eldonis sian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887.

Jen en malmultaj vortoj la sekreta vivo de Esperanto; pri la publika vivo ĉiuj pli-malpli jam scias. Mi nur esperas, ke malgraŭ mia peno mallongigi tiun historieton, mi ne kulpigis pro malekzakteco. Mi esperas ankaŭ, ke tiu artikolo estas kontentiga respondo al la ĝenerala demando: Kiel naskiĝis Esperanto?

Jacques Gaucher.--

KAPROMPILOJ.--

Sub ĉi-tiu rubriko mi intencas prezenti ĉiunomonatan problemon por ĝies amuzo. Kelkajn el tiuj problemoj oble vi jam scias kaj konas sed certe estas interesa konstati, kiel respondos tiuj, kiuj ne konas la solvon.

Vinvendisto posedas kruĉon plenan de vino, kiu entenas 24 litrojn. Venas al li tri aĉetantojn, kaj ĉiu deziras aĉeti ok litrojn de la vino. Sed la vendisto havas nur ankoraŭ tri kruĉojn, kiuj povas enteni 13, 11, kaj 5 litrojn. Tamen li sukcesas per transversaĵo, ke fine el la tri grandaj kruĉoj estas po ok litroj, kiujn li povas vendi al la klientoj. Kiel li transversis?

Se iu el la legantoj konas bonan kaprompilon, bonvolu sciigi min por, ke mi povu transdoni ĝin al la KEK-anoj.

LA ARTO FRANCA EN LA USONAJ KOLEKTOJ

de: F-ino Hélène Richard

La unuan impreson, kiun sentas fremdulo, kiam li vizitas la usonajn kolektojn kaj muzeojn estas, ke ĝi staras nekredebla riĉaĵo. La plejparto de la epokoj, de la civilizadoj, de la skoloj kaj de la artistoj kuŝas tie.

Por amatoro, eskurso en la Unuiĝintaj Statoj estas vera eltrovo de tiuj ĉefverkoj, kiujn li konis nur dank' al reproduktaj. La franca arto de la impresionismo ĝis nia epoko estas efektive unu el la plej kompletaj kaj perfekte reprezentitaj en la usonaj muzeoj.

Tie estas reprezentitaj ne nur la skoloj el ĉiaj tendencoj kaj el ĉiaj gravaj personecoj sed ankaŭ grandega nombro de la plej signifaj specimenoj troviĝas tie. Tiel Francujo nun multe pli malriĉa ol Usono koncerne manifestigo de la moderna franca arto.

Tiuj riĉaĵoj kaj tiu abundo en la muzeoj usonaj kolektiĝis unue dank' al privataj entreprenoj (Solomon R. Guggenheim, Novjorko - Phillips kaj Freer, Galerioj en Vaŝingtono, Galerioj de la universitatoj Harvard, Yale, ktp.) due dank' al oficialaj potencoj (Nacia galerio en Vaŝingtono.)

La usonanoj scifas pri edukado kaj unu el la kolektoj, kiu plej bone respondas al tiu deziro estas la kolekto de ĉ-ro Chester Dale, ekspoziciita en la Nacia Galerio de Vaŝingtono dum 1941. Tiu kolekto inkluzivas Daubigny (Hadoismo), Corot (La konata Agostina), Courbet (Realismo), Chavannes (Simbolismo), Daumier, Monticelli, kaj la impresionistoj Boudin, Bazille, Berthe Morisot, Manet, Degas, Pissarro, Sisley, Monet, Renoir, Cezanne (Pejzaĝo de Provence, Figura de mia filo Paul kaj de mia Louis-Guillaume), Gauvin (Memfiguro, 1889).

En la muzeo de Baltimore, la kolekto Cone posedas gravajn verkojn de Cezanne, Renoir (La Levitianoj - 1886-1889) Gauguin (Vahine, no te vi, 1892) kaj Van Gogh (Le Ŝuoj, 1887).

En la muzeo de Philadelphie troviĝas disigitaj pentraĵoj de Manet, Degas, Pissarro, Sisley Berthe Morisot, Seurat, Mary Cassatt, Van Gogh (La Sinjorino Rouhin kaj ŝia filo), Monet (1882 ĝis 1894) kaj "La Grandaj Sinbanantoj" laŭ Cezanne.

La Metropolitena Muzeo en Novjorko kun Degas, Cezanne, Gauguin, Van Gogh (L' Arlesienne, 1885), Tournesols - 1887, Les Cyprès - 1889), La Muzeo de Belaj Artoj en Bostono kun Degas, Pissarro, Monet, Sisley, Renoir, Cezanne (Portreto de Sinjorino Cezanne kaj Le Tournant) kaj Van Gogh. La Instituto de Arto en Ĉikago kun unu el la ĉefverkoj de Seurat (Dimanĉa Posttagmezo en La Grande Jatte).

Ĉiuj muzeoj, ĉiu periodo havas siajn fervorulojn sed kubismo ŝajnas esti la plej bone reprezentita. Picasso, la plej belaj specimenoj de liaj blua kaj rozaj periodoj estas en Usono: "La Vivo", 1905 - Muzeo de Cleveland; "La Haragango, La Aktoro", 1905 - Muzeo Metropolitane de Novjorko; "La Familio de Foirjonglistoj" 1905, en la Galerio Nacia - kolekto G. Dale; "Fraŭlinoj de Avignon" Mezeo de Arto moderna Novjorko.

Estas en la muzeo Solomon R. Guggenheim en Novjorko, en la Muzeo de Filadelfio kaj en la muzeo de Arto moderna de Novjorko, kie pendas la plej rimarkindaj kaj plej interesaj verkoj pri kubismo.

Tiu ĝenerala admirado pri moderna arto renversigis la usonan arton kaj okazigis la Internacian Ekspozicion pri Moderna Arto en 1913, nomitan Armory Show, prizorgita en Novjorko kaj en Ĉikago de la Asocio de Amerikaj Pentristoj kaj Skulptistoj kaj estrita de Art. A. Davies

Tiu ekspozicio kaŭzis memordaton, tiom en spiritalia kaj socia historio de Usono, kion en ĝia arto historio.

Estas la pariza skolo, kiu kaptis la plej grandan sukceson inter la 1,600 verkoj, kiuj ilustris ĝiajn eŭropajn tendencojn. Ekzemple, "La Nudo Malepreniranta Stuparon" de Marcel Duchamp, trafis tiom grandan rezulton, ke oni nun konsideras ĝin, kiel unu el la klasikaĵoj de la pentroarto.

Tiel, la franca arto ĝeestas en Usono, ne nur pro la ekspoziciitaj verkoj en la muzeoj sed ankaŭ pro la influo, kion ĝi prenis kaj konservis en la arto konscio de la usona popolo.

- - - - -

WITOLD MALCUZYNSKI

de : S-ino Jocelyne Gaucher

Antaŭ nelonge visitis nian urbon majstra pianisto Malcuzyński. Estas por ni feliĉa cirkonstanco resumi tiun, kiu estis la kariero de unu el la plej grandaj kaj brilplenaj pianistoj de nia epoko.

Unue, Witold Malcuzyński studis paralele juron, filozofion kaj muzikon en la konservatorio Varsovia. Jozefo Turczyński prezentis lin al Paderewski. Tiel fariĝis li la lasta disĉiplo de la famekonata pola artisto.

Post distingita debuto en Parizo en januaro 1940, Malcuzyński konis siajn unuajn grandajn triumfojn en Sudameriko kaj du jarojn poste en Usono. Ei revenis Eŭropon en 1945. De post, kiel meteoro, krom liaj jaraj koncertoj en Eŭropo, li donis sesdek turneojn en Nordameriko, dek en Sudameriko kaj du fojojn rondiris la mondon. Li ludis kun la plejparto el la grandaj orkestestroj en la du amerikoj, kaj ankaŭ en Eŭropo sub la direkto de la plej eminentaj muzikdirektistoj.

Witold Malcuzyński oni rekonas, kiel unu el la plej grandaj kaj kortuŝaj interpretistoj de Chopin. Estas do ne surprize, ke en 1960, jaro de la kvindeka naskiĝtago de Chopin, li donis pli ol cent dudek koncertojn en Eŭropo kaj en la du Amerikoj.

De post lia triumfa reveno en sia patrujo en 1958, Pollando ne plu rezervas al li nur la skcepton, kiel granda artisto sed plie, tiu de idolo. Oni ofertis al li la ormedalon kaj la honoran civitaneccon de la urbo krakovo kaj ankaŭ la titolon de honora membro de la socio Chopin en Varsovio.

2 - - - - -

DANKESPRIMOJN

En la nomo de K.E.K. kaj, kiel prezidantino de la klubo, mi volas saluti kaj danki S-inon Héroux el Trois-Rivières por ŝia helpo reaktivigi la Esperantomovadon en nia urbo. S-ino estas lerta kaj vigla esp-istino kaj oni ŝuldas multon al ŝi. Thérèse, DANKON.

S-ino Yvette Doré
Prez-ino de K.E.K.